

ROK XXIV.  
LISTOPAD  
N-r 11.



JARO XXIV  
NOVEMBRO  
N-o 11.

EL POLLANDAJ VIDINDAJOJ.



Warszawa. Kastela Placo kun kolono de la reĝo Zygmunt III.

**ESPERANTYSTA POLSKI  
POLA ESPERANTISTO**

WYDAWCY: POLA ESPERANTISTA KLUBO &  
ELDONANTOJ: SOCIETO ESPERANTO EN KRAKÓW

ADRES REDAKCJI I ADMINISTRACJI: KRAKÓW, ul. LUBICZ 34  
REDAKTORZY PROF. DR. ODO BUJWID REDAKTANTOJ  
TADEUSZ HODAKOWSKI

**SENDUBE**

ĉiuj ŝatantoj de la Esperanto-literaturo legas avide la gazeton  
**LITERATURA MONDO**  
ĉar ĝi estas la PLEJ BELA, PURE LITERATURA GAZETO en Esperantujo.

Gian valoron garantias la ĉefredaktoroj:

**JULIO BAGHY kaj KOLOMANO DE KALOCSAY**

la regulaj kunlaborantoj: J. D. Appelbaum, A. Behrendt, P. Bennemann, M. Be-  
raru, M. Blassberg, K. Bodó, T. Cart, Helmi kaj Hilda Dresen, R. Eihenbaums,  
I. Jurysta, S. Kamaryt, E. Knutsson, I. Lejzerowicz, W. Lippmann, T. Morariu,  
J. van Schoor, K. R. C. Sturmer, J. Supichová, Raymond Schwartz, F. Szilágyi,  
L. Totsche, Leono, Felix kaj Lidja Zamenhof, E. Wiesenfeld, kaj aliaj famaj  
verkistoj.

Agentejoj en ĉiuj landoj.

Postulu senpagajn specimenon kaj prospekton.

**ORIGINALAN ESPERANTAN LITERATURON**

donas la eldonprogramo de Literatura Mondo eldonaj por la jaro 1931.

En la serio troviĝas la verkoj de Julio Baghy Kolomano Kalocsay, Jean  
Forge, Raymond Schwartz kaj aliaj verkistoj originalaj.

**DONAS SENPAGE**

volumon de originala Esperanto-romano al ĉiuj mendintoj la eldonejo.

Postulu detalan prospekton ĉe la agento en via lando

Halina Weinstein  
Warszawa  
str. Leszno 99.

Izrael Lejzerowicz  
Łódź

Skwerowa 20. P. K. O. 68.273.

au eldonejo de Literatura Mondo.

Kiel gimnastika metodo de Müller per elpruvita sistemo de ĉiutaga ekzer-  
cado trege fortigas nian korpon, tiel same la memonika metodo de S-ro D. Fajn-  
ŝtejn efektive plibonigas la memoron kaj aliajn psikajn kapablojn.

Ĝi estas speciale utila por studentoj kaj lernantoj ĝenerale donante al ili  
la eblecon kun malgranda peno ellerni la plej malfacilan materialon.

Mi konvinkigis, ke eĉ ellernado de plej laciĝaj kaj enuigaj sciencoj kiel  
priskriba anatomio, topografia anatomio kaj aliaj fariĝas dank' al mnemonikaj  
ekzercoj de S-ro Fajnŝtejn tre facila kaj interesa laboro.

Mi do sincere konsilas al ĉiu fari tiun ĉi provon de memorplifortigado kaj  
estas certa, ke neniu bedaŭros.

Mi havis veran plezuron dum ellernado de tiu ĉi mnemonika kurso, unika  
en sia speco, en Esperanto, kaj esprimas al S-ro D. Fajnŝtejn mian koran dankon.

Vilno, Zawalna N-o 15/7.

Prezidanto de Vilna Esperantisto Societo „Universo“  
Dr. med. A. GURVIČ.

**TREŜĈ — ENHAVO:**

**O. BUJWID:** KRAKOVA UNIVERSITATO OFICIALIGIS LEKTORON DE  
ESPERANTO. **FOZO:** ANTAU LA 15 DECEMBRO. **TH:** LA POLLINGVA MO-  
NATA REVUO POR PROPAGANDO DE ESPERANTO APEROS! **S. A. KO-  
WICZ:** MIAJ KONGRESAJ IMPRESOJ. N. N.: EHO DE LA KONGRESO EN  
ŁÓDŹ. **ĈU LA ANGLA LINGVO IĜOS LA INTERNACIA** (EL LA PAROLADO  
DE PROF. HENRY W. HETZEL). **R. O.:** IMPRESOJ PRI „COMO-ESPERANTO  
1930“. **LENA:** LA PATRINO. **EL LA „KAŜITAJ VORTOJ“ DE BAHU'LLACH**  
(ESPERANTIGIS LIDJA ZAMENHOF). **O. B.:** EL LA GAZETARO. **BULTENO**  
**No 2 DE 23a UNIVERS. KONGRESO DE ESPERANTO. RECENZO. BULTENO**  
**DE U. E. A. DE LA REDAKCIO.**



# POLA ESPERANTISTO

MONATA REVUO DE ESPERANTISTA MOVADO EN POLUJO  
KAJ EKSTERLANDE.

## ESPERANTYSTA POLSKI

MIESIĘCZNY PRZEGLĄD RUCHU ESPERANCKIEGO W POLSCE  
I ZAGRANICĄ.

ROK XXIV JARO

KRAKÓW  
LISTOPAD 1930 NOVEMBRO

Nr 11 N-o

## KRAKOVA UNIVERSITATO OFICIALIGIS LEKTORON DE ESPERANTO.

**G**rava paŝo estas farita de Universitato Jagellona. De nun ni havas lektoron de nia lingvo oficiale nomitan de Universitata Estraro. Unua lektoro estas de ni ĉiuj bone konata, juna samideano Tadeusz Hodakowski, kiu jam kelkajn jarojn kunlaboras ĉe la redakcio de Pola Esperantisto, estas ŝatata kursgvidanto kaj gimnazia profesoro de pola lingvo en la Oka Knaba Gimnazio. Mi ne parolos pri personaj kvalitoj de nia novnomita lektoro, ĉar ĉiuj, kiuj lin konas, bone tion scias. Li estas vere inda iĝi ano de Lingva Komitato — tio estas la demando de mallonga tempo.

Ni longe atendis la tempon, kiam fine Esperanto, vera Mondlingvo okupos ĝustan lokon ĉe krakova universitato. Jam estis de longe faritaj penadoj por atingi tiun celon.

Nun la fama lernejo de Nikolao Kopernik, unu el plej maljunaj altlernejoj de Eŭropo, Krakova Jagellona Universitato, inter siaj kunlaborantoj posedas lektoron de Esperanto.

La patrujo de nia Majstro, kiu longe hezitis ne decidante ĉu fakte la genia eltrovaĵo estas fina solvo de la plej komplika lingva afero, kiu dum jarcentoj okupis grandajn homajn korojn kaj pensojn, nun kredas je sia filo Zamenhof. Ofte, tre ofte ni sammaniere hezitas pri multaj faritaj eltrovoj. Ni ne kredas ĝis fine iu el alia lando konstatas tion. Kiom da grandaj eltrovoj pereis nur pro tio, ke la eltrovinto ne povis trovi en sia patrujo indan aprobon kaj subtenon!

Depost nuna momento ni povas esti certaj, ke la afero de mondlingvo iros ĉe ni rektan vojon.

Grava subteno de nia afero estas ankaŭ la rekomendo de esperanto al lernejestroj, presita en oficiala cirkulero, ĵurnalo de la krakova lerneja distrikto. Krakova lerneja Kuratoro, kiu estas unu el fondintoj de Pola Esper. Instituto, s-ro Dro Tad. Kupczyński, konstatas en ĝi, ke estas tre rekomendinde al ĉiuj lernejestroj plivigligi la atenton de lernantoj kaj instruistoj pri lernado de la Esperanto, speciale por havigi multajn junajn gvidantojn al niaj eksterlandaj gastoj dum la 23-a Kongreso, parolantaj flue Esperanton.

O. Bujwid

## ANTAŬ LA 15 DECEMBRO.

**P**roksimiĝas la tago Zamenhofa. Oni preparas diversajn memorstrofojn, artikolojn, paroladojn k. t. p. Ĉion en senco de Zamenhofaj idealoj.

Sed — ĉu ĉion? Zamenhof diris: „Sur neŭtrala lingva fundamento dissaltos la obstinaj baroj“... Mi do demandas: — Kial en unu urbo (ekz. Warszawa) 5 aŭ eble pli da grupoj esperantistaj, kaj ne unu? Kial inter ili staras „muroj de miljaroj“?... Se pro iaj ajn motivoj aŭ kaŭzoj teknikaj ne ebla estas unu klubo en granda urbo (ekz. London, Paris, Berlin...), kial do almenaŭ ne ĉiumonata kunveno de ĉiuj en unu loko?...

Ĉar imagu: venis al vi 4 eksterlandaj samideanoj kaj demandas pri adreso de varsovia klubo esper.. Se vi estas senpartia „neŭtral-fundamentulo“, vi estos en embaraso. Vi rigardas viajn gastojn atente:

— Kiaj ili estas?... Fine vi donas al ili skriban demandaron:

Profesio . . . . .  
Religio . . . . .  
Nacio . . . . .  
Partio . . . . .

kaj poste laŭ respondoj vi direktas:

Unu — al la grupo „Laboro“  
Alian — . . . . . „Konkordo“  
Trian — . . . . . „P. E. S.“  
Kvaran — . . . . . „J. S. H.“ k. t. plu...

Sed ili faras mirigitajn mienojn kaj diras:

— Ni estas ĉiuj el unu lando, unu urbo, ni loĝas eĉ en unu loĝejo, do ni deziras esti — kune...

Hm... kune?... Iru en la parkon, tie vi sidos kune kaj oportune.

Ĉu ne estas tempo konforme al la Zamenhofa idealo — forigi la murojn? La 4-a tulpola kongreso en Łódź klare montris, ke ni maturiĝis por tiu ĉi faro. Jen proksimiĝas la 15 XII, bona okazo por fari generalprovon de la unuiĝo. Mi estas konvinkita, ke la provo estos bondecida por posteaj rilatoj inter la dispeciĝinta samideanaro.

Mi jetas la ideon por pliiĝustigi la solenecon de Zamenhofaj festoj. Unu urbo — almenaŭ unu festo komuna.

„Unu koeficiento“, dirus s-ro Zawada...

Fozo.

## LA POLLINGVA MONATA REVUO POR PROPAGANDO DE ESPERANTO APEROS!

**E**n la oktobra numero de P. E. ni prezentis en la artikolo s. t. „Pri nia laboro“ la neceson de pollingva ĵurnalo por propagando de Esperanto. La prezentita propono tre favore estas akceptita inter la samideanaro, pri kio atestas multaj ricevitaj leteroj kaj kuraĝigoj por ĝin realigi. Multaj samideanoj jam antaŭmendis la gazeton. Ekzistas grupoj, kiuj postulas po 100 ekzempleroj de ĉiu numero. Troviĝis eĉ samideano, kiu tiel kredas je sukceso



de nia propono, ke ne nur antaŭmendis la gazeton, sed eĉ enpagis la abonprezon. Tiu fakto estas speciale substrekinda, ĉar la menciita samideano estas laŭ nia scio senokupa laboristo. Jen imitinda ekzemplo de ofereco kaj plena kompreno de la afero!

Konsiderante bonajn impreson kaj apogon, kiun nia ideo trovis inter la legantaro ni **decidas komenci eldonadon de la revuo**. Kiel aperdaton de unua numero ni fiksas tagon de **1-a januaro 1931**. La prezo restos la sama, kiel ni proponis en la artikolo, t. e. 20 groŝoj por unu ekzemplero. Se niaj spezoj tion permesos, ni eble povos konsenti rabaton ĉe abonado de granda nombro da ekzempleroj. Tial ni preferus, se la societoj preparus listojn de abonantoj, por ke ni povu la gazeton elsendadi laŭ unu adreso. Sed la ĝisnunaj antaŭmendoj ne sufiĉas! Por sukcesigi plene la ideon ni nepre bezonas pluajn mendojn. Bonvolu ilin sendi tuj! Relegu la artikolon, por bone orientiĝi en la afero! Verkemaj samideanoj bonvolu sendi siajn bonajn propagandajn artikolojn. Lasta dato de ilia ricevo por la januara numero estas la 10 de decembro. Kian titolon vi proponas por la revuo? Kian subtitolon kun klarigoj? Mendu, proponu, sendu la artikolojn, informu vin ĉe la Redakcio de Pola Esperantisto, Kraków, Lubicz 34. Poŝtsparkasa konto n-ro 406.660. Komercaj anoncoj por la revuo malkare akceptataj!

Th.

## MIAJ KONGRESAJ IMPRESOJ.

### MALGRANDA FELIETONO.

**S**e Vi demandos min, kara legantino, pri miaj kongresaj impresoj en Łódź, mi sincere respondos, ke ili dumentaj. Preskaŭ de la horo de mia alveno kongresurbon, mi havis la miksaĵon de sentoj — agrablaj impresoj tuj ŝanĝiĝis je malagrablaj, enuaj je emociaj ktp.

Mi rakontu tion de la komenco. Vendrede, vespere, mi venis solene al Łódź en la salonvagono de la tria klaso. Mi opiniis, ke tiel konata esperantisto, kiel mi, estos renkontata solenoficiale kaj eĉ havis tiue freŝan kolumnon. Mi atendis la militorkestron, la urbestranaron kun kutima „pano kun salujo“ (arĝenta), sed (terura disreviĝo!) — neniu min renkontis, neniu atendis.

Mia elokventa antaŭpreparita dankparolado restis nedirita, por la ĉagreno de posteuloj. Malagrabliĝinta, mi malsupreniris la majestan ŝtuparon de Lodza stacidomo kaj ĉe ĝia fino mia koro batiĝis maltrankvile, kiel en Zamenhofa versaĵo: mi ekvidis nian karegan Prezidanton Prof. Bujwid kun lia disĉiplo kaj heroo de lodza kongreso — Dro Mędrkiewicz kaj miaj malgrablaĵoj tuj forflugis. Mi diris: „Ho mia kor' ne batu maltrankvile“, varme prenis la doktorajn manojn kaj ni komencis babilu, tie, sur la ŝtuparo. Mi demandadis, respondadis (ho, tiuj agrablaj unuaj minutoj de kongresaj renkontiĝoj!) ĝis la sekvonta vagonaro alportis al ni la amason de ĝekongresanoj kun la ĉefgvidanto S-ro Joŝo. Kun granda bedaŭro mi forlasis stacidoman ŝtuparon kaj veninte dormlokontuj ekdormis kiel feliĉa homo. Post tiu agrabla renkontiĝo miaj sonĝoj estis ankaŭ agrablaj — „en sonĝo principon mi vidis“, sed iom post iom ŝia vizaĝo ŝanĝiĝis kaj

subite mi ekvidis iajn terurajn kapojn kun magiaj surskriboj L. K., I. C. K., P. E. D. ktp. Svitante, mi vekigis.

Niaj kongresoj, kiel estas ĉie konate, altiras plejparte la belan sekson de la esperantistaro (pro tio ili estas tiel babilemaj) do mi tiel longtempe min beligis, ke nur antaŭtagmeze alvenis akceptejon. Gaje flirtis nia bela standardo sur la magistrata domo, vekante la admiron de preterpasantoj, kiam mi eniris por ricevi miajn kongresdokumentojn.

La ŝtuparo estis plena da gebabilantoj. Estas interesa psikologia fakto ke gekongresanoj ĉiam preferas ŝtuparon por babiladi, se oni ne babilas dum ĝeneralaj kunsidoj.

Tuj min ĉirkaŭigis la amaso da novaj kaj malnovaj amikoj, sekvas manpremoj, brakumoj, kisoj (la lastaj plejparte en la malplenaj kaj malhelaj anguloj de akceptejoj) kaj la tempo forflugas nesentata, ĝis la momento, kiam ni devas iri tagmanĝi en la la restoracio speciale por ni rezervita.

Mi venas tiun manĝejon kaj denove mi sentas malagrablecon: miaj ĉiuj amikoj ankoraŭ ne venis — ili babilas, manpremas kaj kisas ankoraŭ en akceptejo. Mi estas kvazaŭ sola inter novaj nekonataj manĝemuloj, kiuj preferis manĝi, ne babili. Ili eĉ ne rimarkis min, tiuj ĝejnuloj, kaj ĉu estas interesa iu maljuna grizharulo, por ili, kiuj trinkas plenbruste el la plenviva pokalo de juneco?

Sed baldaŭ mi ekvidis en la malproksima angulo ian arkĉielan makulon. Mi agrable konstatis la ĉeeston de ia alinacia samideanino kaj tuj mi salutis ŝin kaj baldaŭ ni amike babilis rememorante diversajn kongresojn, kiujn ni vizitis, ne konante unu la alian. La tagmanĝo en la ĉeesto de nia simpatia riga samideanino agrabligis modestan komunan tagmanĝon kaj rapide pasis (Speciale antaŭ la L. K.K. mi devas konfesi ke dank' al tiu babilado mi distreme manĝis dufoje la dolĉaĵon kaj distreme pagis unufoje.) Finfine, iom malfruiĝinte, ni alvenis akceptejon por malfermi la kongreson.

Estis bela, granda, verde ornamita salono kun granda pentrajportreto de nia Majstro, la loko kie ni kunvenis. Baldaŭ ĝi estis tuteplena, venas la reprezentatoj de la aŭtoritatoj, mi vidas la grizan kapon de S-ro Bujwid, kiu anoncas al ni solene, ke la IV Pollanda Esperantista Kongreso estas malfermita kaj proponas Dron Mędrkiewicz kiel Prezidanton de nia kunveno. Ĝenerala aplaŭdado!. La ĉeestantaro, ankaŭ kun granda kontento elektas kiel vic-prezidanton S-on Felikson Zamenhof, fraton de la Majstro. Baldaŭ ni aŭdas vivplenajn sonojn de la bona nacia himno de Pollando. Komenciĝas kongressalutoj, ĉiam bondeziraj, kiam aeron frapas la falsa noto. La reprezentanto de klasbatala grupo „salutas“ la ĉeestaron en pola lingvo, dirante interalie, ke ni ne imagu, ke tiu iros kun ni ĉiuj. Baldaŭ ĝi sendos nin al la diablo, ĉar ne estas por ĝi sama vojo kun ni. Post tiu „saluto“ la plej ĝentile estis deziri por tiu grupo „feliĉan vojon“, kion mi volonte faras. Sed tiu ĉi makulo, kiu iom min ĉagrenis, baldaŭ dronis en la komuna ĥoro de bondeziroj. Tre ĉarma estis la salutparolado de f-ino Zamenhof. Mi tre ŝatas aŭdi kaj legi la vortojn de f-ino Lidja, filino de nia neforgesebla Majstro. Estas ĉiam ia orkolora aŭtuna sento en ŝiaj vortoj kaj aŭdante ŝin parolanta pri la lumo, kiu eniru en nian esperantan vivon same kiel ĝi sammomente eniris dum



sia parolado en la kongressalono krepuskplenan, mi nevole komparis tian brilantan parolturnon kun la sama de nia ĉeforatoro S-ro Privat. Sed ĉe li mankas tiuj sonoj de romantika melankolieco, kiujn donas al ni f-ino Zamenhof.

Tiel konkordigitaj ni aŭdis la gajajn frĉsajn sonojn de l' „Esp-ero“. Ĉiuj ekstaras kaj ni kantas pri nova sento kaj pri pacaj batalantoj.

Dum la paŭzo ni denove babilas, mi rekontas malnovajn amikojn, mi salutas S-inon Cense, nian parizan varsovianinon aŭ varsovian parizaninon, mi vidas pastran vestaĵon de pastro Furmanik, sed la senpardona sonorilo memorigas al ni pri la dua parto de la kunsido. Pri ĝi mi menciis, ke en tiu ĉi parto S-ro Zawada, la iniciatinto de la Pollanda Esp.-Adresaro kuraĝe batalis kun la malvarmeco de samideanaro rilate al tiu entrepreno kaj kun la sonorilo de kunsidprezidanto, kiu admonis la trouzon de tempo.

Post la oka, kiam kunsido finiĝis, ni iris al la Picadilly-manĝejo, kiu estis speciale rezervita por nia „raŭto“. Malgraŭ ke „Heroldo de Esperanto“, presante la kongresprogramon, post tiu vorto „raŭto“ starigis la demandsignon, tiu festeno pasis sub la signo de interjekcio — tiom gaja ĝi estis. Pacaj batalantoj kolektiĝis ankaŭ sub la signo de la Muzoj, kiujn tiom manplene al ni prezentis ilia biaŭstoka paĉjo — S-ro Ŝapiro. La bela voĉo de la kantistino tiom min ĉarmigis, precipe dum la kantado pri „triĉevala neĝveturado“ ke mi volonte kaptus tiun belan ĉarmulinon kaj kune neĝvojaĝus, se mi ne timus ke ĵaluza paĉjo riproĉos min pri tiu facilanima paŝo. Sed li, certe, komprenis miajn pekajn pensojn kaj tiel ĵaluzo kaj fajranime rigardis min, ke mi rapide forlasis danĝeran lokon kaj litlokiĝis, nature, hejme, ne en Piccadilly. Feliĉe por mi kaj L. K., I. C. K. ktp. neniam songoj min vizitis kaj mi dormis kviete, kiel U. E. A.-ano kiu frupagis sian jaran kotizajon. Mi ne scias, ĉu ĉiuj kongresanoj povus dormi tiom kviete.

Alian tagon, dimanĉon, la vetero estis malbona. Kiam mi venis ĉe Zamenhofa strato pluvis senĉese kaj la gutoj konstante frapante traboris eĉ niajn ĉapelojn kaj mantelojn. Dank' al tiu malĝoja fakto mi ne bone aŭdis kion diris nia ŝatata Prof. Bujwid sub la memortabulo, ĉirkaŭita de la arbaro de pluvombreloj.

Post la inaŭguro de memortabulo multaj el ĉeestantoj iris al la kuracista kunveno — eĉ unu doktoro de juro (eble li eraris dank' al longa „raŭtado“ lastnokta!) Mi, malgraŭ ke mi estas kuzo de du doktorinoj, honeste ĉeestis la U. E. A.-kunsidon. Ĝi estis tre interesa. La raporto de Ĉefdelegito estis profunda kaj tiom kortuŝanta, ke eĉ unu el la ĉeestantoj pagis sian membropagon por kuranta jaro. Aliaj restis firmanimaj kaj multe aplaudis, sed ne pagis.

Post tiu solena kunsido ni iris tagmanĝi. Sed mi, ho pekulo, ne iris kun ĉiuj, sed preferis esti invitita de unu privata eminentulo tagmanĝi kune kun kongresaj eminentuloj.

Kaj mi devas konfesi ke mi ne bedaŭras, ĉar la eminentuloj kaj tagmanĝo estis bonegaj. Dank' al tio mi iomete malfruĝis kaj kiam mi venis la duan ĝeneralan kunsidon, laŭ miencoj de kunsidantoj mi vidis ke mi ne ĉagrenu pri mia malfruigo, do mi decidis iom dormeti en la malhela angulo de la kongressalono, post bona tagmanĝo, kiam

tute neatendite mi travivis unu el la plej emociaj, plej impresaj momentoj dum la tuta Kongreso. Temis pri la raito de la aparta esp. societo memstare korespondi kun alilandaj aŭtoritatoj. Nia ŝatata Dro Mędrkiewicz elokvente defendis tiun vidpunkton, kelkaj voĉoj lin subtenis, aliaj, kune kun Prof. Bujwid, atakis. La batalado estis tre akra, emocia, interesplena, tuta en esperanto, oni eĉ komencis malpaci, kiam falis la vorto de konkordo. Parolis Dro Sakowicz. Mi ne tro ŝatas tiun oratoron, sed se estus eble, mi volonte mem kisus lin, dum tiu kortuŝanta momento, kiam li diris, ke volus kisi Dron Mędrkiewicz pro lia vigla, fruktodona, sed ne tro disciplinema laborado por esperanto. Tiun kison donis al Dro Mędrkiewicz Prof. Bujwid, ĉirkaŭbrakante lin. Estis freneza aplaŭdado post tiu kortuŝanta sceno.

Iom poste Prof. Bujwid parolis al ni kongresan ferm-vorton kaj denove eksonis nia „Espero“.

Pli ol kvaronon de la jarcento mi aŭdas tiujn marŝajn vortojn de Menil. Kaj ĉiufoje, kiam mi ilin kantas, mi sentas min iom pli bona, iom pli supera ol dum tiu ĉiutaga vivo.

Estas io emociiganta en tiuj modestaj vortoj pri la popoloj kiuj faras en konsento unu grandan rondon familian.

Baldaŭ tiun rondon ĉiu el ni povos (kaj devas!) ĉeesti. Ni ne forgesu, ke la sukceso de Krakova Kongreso dependas inter alie de ni mem.

Do, ĝis la revido en Kraków.

S. A. Kowicz.

## ĤHO DE LA KONGRESO EN ŁÓDŹ.

Dum la malfermo de la IV Tutpola Kongreso en Łódź havis lokon solena momento, kiu pro eraro ne estis menciita en la raporto en la oktobra numero. Nome s-o Cz. Pruski en nomo de Lublina Esperanto Societo transdonis al Dro J. Mędrkiewicz, prezidinto de tiu Societo kaj prezidanto de l' kongreso honoran diplomon kiel dankon kaj rekonon pro la laboro, kiun faris en Lublin la meritplena Dro Mędrkiewicz por nia movado.

Per bruaj aplaŭdoj la kongresanaro esprimis sian kontentecon pro tiuspeca distingo de nia konata samideano.

N. N.

## ĤU LA ANGLA LINGVO IĜOS LA INTERNACIA?

(El la parolado de prof. Henry W. Hetzel dum la postkongreso en Londono).

**K**iel vi scias, mi venis el lando, kie la angla lingvo estas ĉie uzata kaj kie por ĉiu interna afero ĝi bone sufiĉas. Sed ankaŭ oni fanfaronas, ke eĉ en eksteraj kontaktoj ĝi plene taŭgas. Oni diras, ke ĉie, kien ajn en la mondo oni vojaĝadas, oni trovas la anglan lingvon. Kompreneble, estas kelkaj personoj en ĉiu menciibla urbo, kiuj konas la anglan lingvon, sed ĉu ili troviĝas en ĉiu situacio, en kiu la vojaĝanto ĉeestas? Tio estas alia afero! Eĉ se estas vere, (kaj mi elsperte dubas), ke per tiu lingvo oni povas ie kaj iam aĉeti fervojbileton en Francujo, ricevri ĉambron en germana hotelo,



mendi, manĝaĵojn en itala restoracio aŭ aĉeti bagatelajojn en Japanujo, — tiuj ne estas la postulaj faktoroj en la lingva demando. La kru-daj bezonoj de vojaĝado kaj nutrado ne estas la solaj, ne la decidaj pruvoj de aplikebleco kaj sufiĉeco de iu lingvo precipe en internaciaj rilatoj. La intimiĝanta mondo kun kreskantaj kontaktoj kaj rilatoj havas bezonon de io pli taŭga. Pli kaj pli la homoj kunlaboras, ni ja kun homoj de ĉiuj landoj en samtempa ĉeesto devas kunlabori, por la progreso de l' homaro. Do, la vera pruvo de la sufiĉeco kaj aplikebleco de iu lingvo estas la internacia konferenco. Neniam en iu lando estis ia kongreso, vere internacia, en kiu nur unu lingvo — ne eĉ la vaste uzata angla — estis la sola.

La fakto estas, ke neniu nacia lingvo eĉ **tendencas** esti la sola en interlandaj aferoj. Ĉu la studado de la franca, la germana kaj la hispana lingvoj malkreskas en Anglujo kaj Usono? Kompreneble, la angla estas instruata en ĉiuj eŭropaj landoj — eĉ en kelkaj ĝi estas la dua, aŭ la plej grava (post la nacia, kopreneble). Sed ĉu la aliaj lingvoj nun, kiel antaŭ kvin aŭ dek jaroj, ne estas ankaŭ instruat-aj? En la urbo New York la publikaj lernejoj instruas la francan lingvon al pli da studentoj, ol al tiuj, kiuj studas la germanan, la hispanan, la italan kaj la latinan, ĉiuj kune! Ĉu ĉi tio argumentas, ke oni en Ameriko pretiĝas por akcepti la francan kiel mondlingvon?

En Anglujo kaj Usono eĉ la kontraŭstaremuloj de Esperanto in-siste konstatas, ke ni devas, devegas, studi fremdajn lingvojn por plivastigi nian komercon. Do, ne timu pri la estonta superreĝeco de la angla! En la signifplenaj aferoj, en kiuj ĝi konkuras kun Esperanta, ĝi estas jam venkita.

## IMPRESOJ PRI „COMO-ESPERANTO 1930“

Itala Kongreso de esperanto havis ĉi tiun jaron, unuafoje, turis-man k. internacian karakteron. Nian XV-an ĉeestis 30 samid. el eks-terlando, reprezentitaj: Anglujo, Francujo, Nederlando, Polujo, Ĉeko-slovakujo, Aŭstrujo, Japanlando. Kolektiva vizito per benkoĉaro al Milano; per speciala ŝipo, tuttaga ekskurso sur la lago: 240 partoprenas. Verdaj flagoj, samideana atmosfero, ĉeesto de multaj neesperantistoj. Neniom da defikto.

Itala Federacio akcentos sian agadon en direkto de pli vastaj turismaj aplikoj de esperanto, ili sin montris tre oportunaj kaj profitaj laŭ ĉia vidpunkto. Do kun vera varma intereso ni atdis ĉe sole-na malfermo, dum saluto-paroladoj, S-ron Petit el Parizo inviti nin al Parizo — 1932, kaj precipe Fraŭlinon Dokt. Muszkatblat el Varsovio inviti nin, per ĉarmaj kaj allogaj vortoj, al Kraków — 1931. Estas kun sincera plezuro ke mi ŝatas esprimi al P. E. D. kaj al ĉiu pola amiko — mi, bone memoranta Varsovion, tagmanĝon sub verda stelo en „Gastronomja“, barĉon, kastelon kaj ĝardenojn de Kraków — nian dankemon pro la bonega oratorino, kiun Polujo sendis al nia esperanto-festo en Como.

En nomo de P. E. D. ŝi invitis nin al libera Polujo, transdonante saluton kaj legante leteron de Prezidanto de P. E. D., P-ro Bujwid. Kaj tiom kortuŝe, flate, kaj delikate ŝi parolis pri ŝia inklino al nia lando, ke ni tute ne miris, sed nur admiris, kiam subite ni aŭdis ŝin

pasi senĝene al parolo en itala lingvo, ne sen majstraj citoj el itala literaturo, kaj rimarkis, ke pri nia lando mem ŝi ne timus instrui al multaj el ni. Tre trafe ŝia modela itala diro impresis sur neesperantista publiko kaj sur aŭtoritatoj, kiuj ofte aŭdas kaj ripetas ke esperanto malhelpas intereson al kono pri niaj naciaj lingvo kaj kulturo.

Mi pensas ke ĝuste ekde tiu momento Itala Federacio cerbumas pri organizo de sia Turisma karavano al Kraków. — En niaj kunsidoj oni resume konstatis la efektivajn notindajn progresojn de lasta tempo pri esperanto-movado en nia lando, kaj ni fiksas rendezuon en Padova — 1931, je fino de julio, por ekveturo kolektiva ...al Kraków, ĉefurbo 1931, ĉu ne?

R. O.

## La patrino.

Patrino, la kapon plumbpezan  
sur viajn genuojn mi klinas...  
Min regas, subpremas malĝojo,  
funebbran doloron ĝi ŝpinas.

La koro?... Tombejo de l' revoj,  
velkintaj sen tuŝ' de sunvarmo  
Pri veo senvorta atestas  
helpvoka, malgranda larmo...

Kompate forviŝu la larmon,  
mutigu la veon en sino  
kaj plantu esperon en koron,  
ho, mia plej kara patrino...

Sub via kareso formortas  
doloro, malĝojo en sino;  
esperon kaj forton alportas  
la kora kompat', ho patrino.

Lena.

EL LA

„KAŜITAJ VORTOJ“

DE BAHU'LLACH.

El la araba lingvo.

**H**o Filo de Homo! Vualita en Mia nememorebla esteco kaj en la pratempa eterneco de mia esenco, Mi sciis Mian amon al vi; tial Mi kreis vin, bildis en vi Mian bildon, kaj malkaŝis al vi Mian belon.

Ho Filo de Esteco! Ami Min, por ke Mi vin amu. Se vi Min ne amas, Mia amo neniel povas vin atingi. Sciuj tion ĉi, ho servanto!

Ho Filo de Homo! Se vi amas Min, turnu vin for de vi mem; kaj se vi celas Mian kontentecon, ne atentu la propran; por ke vi mortu en Mi kaj Mi vivu eterne en vi.

Ho Filo de Esteco! Vi estas Mia lampo kaj Mia lumo estas en vi. Ĉerpu el ĝi vian radiecon kaj serĉu neniun, krom Mi. Ĉar Mi kreis vin riĉa kaj malavare verŝis sur vin Miajn favorojn.

Ho Filo de Mirinda Vizio! Mi enspiris en vin spiron de Mia



propra Spirito, por ke vi estu Mia amanto. Kial vi forlasis Min kaj eksercis amaton alian, ol Mi?

### El la persa lingvo.

Ho Filo de Deziro! Al la jeno turnu vian orelojn: Mortema okulo neniam ekkonos la ĉiamdaŭran belon, nek senviva koro trovos ĝuon en io, krom velkinta floro. Ĉar similulo similulon serĉas kaj trovas plezuron en kompanio de sia spaco.

Ho Filo de Polvo! Blindigu viajn okulojn, por ke Mian belon vi vidu; stopu viajn orelojn, por ke la dolĉan melodion de Mia voĉo vi aŭdu; malplenigu vin de ĉiaj lernaĵoj, por ke el Mia scio parton vi prenu, kaj sendependigu vin de riĉaĵoj, por ke el la oceano de Mia eterna trezorararo ĉiamdaŭran parton vi ricevu. Blindigu viajn okulojn, tio estas al ĉio, krom Mia belo; stopu viajn orelojn al ĉio, krom Mia vorto; malplenigu vin de ĉia lernaĵo, krom la scio pri Mi; por ke kun klara vido, pura koro kaj atenta orelo la kortegon de Mia sankteco vi eniru.

Ho Miaj Amikoj! Estingu la lampon de eraro kaj lumigu en via koro la ĉiamdaŭran torĉon de Dia gvidado. Ĉar post nelonge la provistoj de l' homaro en la sankta ĉeesto de l' Adorato nenion akceptos, krom plej pura virto kaj agoj de senmakula sankteco.

Ho Filo de Mia Servantino! Se vi ekvidus la senmortan regnon, vi penigus foriri el tiu ĉi mortema mondo. Sed en la kaŝo de unu antaŭi vi kaj malkaŝo de la alia estas mistero, kiun, krom kun pura koro, neniu povas kompreni.

Ho Infanoj de Fiereco! Por pasema reĝolando Mian senmortan regnon vi forlasis, per kolora livreco de la mondo vin ornamis kaj fanfaronas pro tio. Je Mia belo! Ĉiujn Mi kunvenigos sub la unukoloran kovraĵon de polvo kaj forviŝos ĉiujn tiujn kolorojn de vi, krom de tiuj, kiuj akceptas la Mian, kiu estas pura de ĉiaj koloroj.

Esperantigis Lidja Zamenhof.

## EL LA GAZETARO.

En la 44 n-ro de Heroldo de Esp. mi legis, ke s-ro Jofebo, kompilinto de siaj belegaj Revuoj ne aprobas la decidon de iu ajn nacia societo elekti la lokon de la estonta Kongreso. Mi estas tute same opinianta. Neniu devos decidi krom la kongresanaro. Se s-ro J. pli atente tralegus la 7-an n-ron de Pola Esperantisto li rimarkus en la unua pago de la n-ro: la rimarkon de la redakcio:

„Atendante la decidon de la ĝenerala kongresa kunsido la redakcio eldonas specialan n-ron k. t. p.

Tuj post la alveno al Oxford mi turnis mian peton al s-ro direktoro Kreutz, demandate lin ĉu la afero estas decidita. Mi ricevis jesan respondon.

Mi devas aldoni, ke jam antaŭ kelkaj monatoj mi korespondis kun la I. C. K. pri la elektota, kongresa urbo kaj neniam aŭdis de ĝi pri iu ajn alia propono. Ankaŭ dum la kongreskunsidoj kaj kunvenoj mi neniam aŭdis pri iu plendo tiurilate. Dum la lasta kunsido ni ĉiuj nin adiaŭis promesante revidi nin en Kraków.

Cu mi devas konstati ke Heroldo estas vere interesa, plej bona, esperanta gazeto? tiom da fojoj mi tion diris, ke ne necesas pluaj laŭdoj.

El la sama n-ro ni ekscias, ke jam antaŭ tricenit jaroj okazis la higiena ekspozicio en Dresdeno. Cu ne estas vere unika historia mirindaĵo? Similajn miraklojn la legantoj ricevas kelkiam kiel donacon de kompotisto en presejo!

Preskaŭ en ĉiu n-ro de Heroldo ni legas tre interesajn detalojn pri la monda rondvojaĝo de s-ro Scherer. Lastatempe Int. Centra Komitato komunikas, ke li faris, laŭ la telegramo el Osaka (Japanujo) dudek prelegojn, dum kiuj partoprenis pli ol ok mil ĉeestantoj. Li faris ankaŭ kvar radiokonferencojn ĉe

diversaj esperantistaj grupoj. Ni vidas ke la delegito de ICK faras tre efike la propagandon kaj deziras al li bonegan sukceson.

La Komerca Cambro ĉe Arras sub la influo de s-ro Andre Baudet vigla Prezidanto de pariza Cambro voĉdonis por la disvastigo de la lingvo en komercaj lernejoj. (L' Eclairer du Soir. Nice).

La sama gazeto komunikas pri la kursoj de Esperanto rekomencitaj ĉe Cannes, konata klimata vintra kuracejo. Antaŭ la milito oni jam gvidis similaĵn kursojn.

**Hungara Heroldo.** Budapest. S-ro Mihalik prave preparolas kelkajn konsiderindajn punktojn de la kongresaj aranĝoj. Arangante nian 23-an en Kraków ni sekvas liajn tre ĝustajn dezirojn. La kongreso, kiel prave diras s-ro M., devas ĉefe konsideri la intereson de la esperantista popolo ne iun ajn alian.

**Espero Katolika.** N-ro 87. La Presbitero s-ro Ramboux ne estas kontenta pri la enhavo de la Plena Vortaro eldonita de SAT. Se la Redakcio petis pri la kunlaborado, ĝi devis konservi difinojn de specialistoj, sed ne ŝanĝi laŭ sia opinio. S-ro R. almetas kelkajn difinojn, kiuj tute ne estas teologiaj difinoj de teologoj.

Tiu dusemajna gazeto estas unu el plej bone redaktitaj kaj belege ilustritaj. Ĉiu katolika esperantisto devas konatiĝi kun ĝi. **O. B.**

## 23-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Kraków 1-a ĝis 8-a de aŭgusto 1931.

BULTENO N-o 2.

25 NOVEMBRO 1930.

**Adreso por leteroj:** Universala Kongreso de Esperanto, Kraków, Lubicz 34.  
**Loka Kongresa Komitato.** Organizigis L. K. K., konsistanta el: s-o dro Odo Bujwid, universitata profesoro — **prezidanto**; s-o dro M. Blassberg kuracisto; s-o ing. Edward Kostecki, direktoro de industria lernejo; s-o ing. Eugenjusz Tor, direktoro de muzeo industria — **vicprezidantoj**. S-o Tadeusz Hodakowski, gimnazia profesoro kaj lektoro de Esperanto ĉe la loka universitato — **ĝenerala sekretario**; s-o Stanislaw Rudnicki — **administra sekretario**. Krome estas fiksitaj kvin sekcioj nome: propagand-gazetara, loĝeja, ekskursa, amuza kaj de kursgvidado. Detaloj sekvas.

**Aliĝoj:** (plua listo)

31. Schatz Ewa, s-ino, Długa 8a. Warszawa. Polujo.
  32. Pęksa Stanislaw, Czarny Dunajec. Polujo.
  33. Schönrich Kurt, Walkmühlstr. 25. Wiesbaden. Germanujo.
  34. Pickard John William, Ackroyd Avenue 5. Gorton. Manchester. Anglujo.
- Jurnalo.** Oficiala organo de L. K. K. estas Pola Esperantisto, tial ĉiuj aliĝintoj ricevas senpage P. E. tuj post sia aliĝo.

**Donacoj.** L. K. K. ricevis donace de s-o Sennomulo 50 zl., de s-o Pęksa el Czarny Dunajec 6 zl.

**Blinda kaso.** S-o Sennomulo enpagis 50 zl. por ebligi al blinduloj partoprenon al la Kongreso.

## INTERNACIA ESPERANTA POSTKONGRESO EN WARSZAWA.

BULTENO Nr. 1.

Varsovia esperantistaro interkonsente kun Pollanda Esperanta Delegitaro (P. E. D.) decidis aranĝi en Varsovio post la Universala Kongreso en Krakovo Internacian Esperantan Postkongreson. Tiucele estas fondita loka Organiza Komitato, kiu jam nun ekkomencis la preparajn laborojn por inde gastigi la Tutmondan Esperantistaron en ĉefurbo de Polujo. En la Komitaton eniris:

s-o Leo Belmont, prezidanto  
 s-o Stanislaw Karolczyk, vicprezidanto  
 s-o Mieczyslaw Kaus,

s-o Kazimierz Zajaczkowski, ĝenerala sekretario, s-o Isaj Dratwer, sekretario, s-o Włodzimierz Miernicki, kasisto — f-ino Janina Burkath, s-o Józef Litauer, f-no Eugenja Paszlein, s-o Edward Wiesenfeld — komitatanoj.

En la plej proksima tempo aperos detala bulteno.

Loka Organiza Komitato.

Adreso: Warszawa, ul. Widok 19. (Polujo).

Pri represo kaj disvastigo de tiu bulteno estas petataj ĉiuj esperantaj gazetoj.



# ADRESLIBRO DE POLLANDAJ ESPERANTISTOJ.

## Oficiala Komunikio Nr. 1.

Okaze de la venontjara XXIII Universala Kongreso de Esperanto en Kraków aperos — sub la redakcia kunhelpo kaj kontrolo de „Pola Esperanto-Delegitaro“ — en la monatoj Februaro-Marto 1931 la unua postmilita „ADRESLIBRO DE POLLANDAJ ESPERANTISTOJ“, preparata jam per 1-jara adreskolektiga laboro.

Ĝi enhavos adresaron de ĉiuj esp. societoj kaj grupoj kaj de iliaj membroj en Pollando kaj ankaŭ de multege da izoluloj, ordigitan: 1) alfabete laŭurbe, 2) laŭfako, 3) laŭnome.

Bonega okazo por antaŭkongresa ekinterrilatiĝo kun samfakuloj kaj samemuloj sciencaj, sportaj, mondkonceptaj ktp. de Pollando (ĉirkaŭ 3000 adresoj presataj!). Pro tio ĝi akceptas ankaŭ en sian anoncparton anoncojn de eksterlandaj samideanoj, dezirantaj korespondadi kun Pollandanoj.

Prezpo por eksterlando: la „ADRESLIBRO“ kun aŭfranko antaŭabone 2 sv. frankoj, post la apero 3 sv. fr. Unulmia anonco 0.50 sv. fr. anonco sur tuta paĝo 50, sur duonpaĝo 30, kvaronpaĝo 20, okonpaĝo 15 sv. fr. Por enlando la samaj ciferoj en p. zloty.

La **tempolimo** por anoncoj estas prokrastita ĝis la 31-a de Decembro 1930. Nova prokrasto ne plu okazos. Kiu alsendos la aligilon post tiu dato, ties nomo povos esti presata nur en la „Aldono“.

Pollandaj grupoj kaj izoluloj, kiuj ne ankoraŭ aliĝis, aliĝu tuj! Mendu Prospekton! Eksterlandanoj — anonciĝu! Ne eĉ unu Pollanda esperantisto, senescepte de la nacio, religio aŭ politika orientiĝo devas en ĝi manki!

Ĉiuj korespondadoj kaj mensendadoj estu direktataj senpere al la adreso:

Redakcio de la „ADRESLIBRO  
de POLLANDAJ ESPERANTISTOJ“  
W A R S Z A W A

M. O. Czerniaków, ul. Zaciszna 2. J. Zawada  
Poŝtĉeka Konto Varsovio 20845.

## RECENZO.

**S. Grenkamp-Kornfeld** — **Kompletny samouczek języka Esperanto ze zbiorem wyrażeń handlowych i radjowych z przedmową prof. A. Cotton**, członka Francuskiej Akademii Nauk. Wydawnictwo: Esperantista voĉo, Jasło. Prezo: 1.25 zł. Paĝoj: 72.

Tre plaĉis al ni divido de la tuta materialo ne en apartajn lecionojn, sed en paragrafojn, el kiuj ĉiu traktas iun specialan aferon. Tiuspeca divido de la lernota materialo permesas, kie ajn ĉesigi la lecionon kaj dividi ĝin depende de trovataj malfacilaĵoj jen je pli grandaj jen je malpli grandaj partoj. Ĉiuj instruataj Esperanton scias bone, ke ne ĉiam samrapide oni povas instrui al kursanoj la saman aferon, ĉar tio multe dependas de tio, el kiaj personoj konsistas nia kursanaro. Divido je 77 paragrafoj permesas laubezon dozi la instruatajn.

Ankaŭ bona estas klarigo de kelkaj gramatikaj ideoj, ekz. kio estas adverbo, substantivo; oni devas nur bedaŭri, ke tiu metodo ne estas plene aplikita en ĉiuj lecionoj.

Sed kial la aŭtoro plue uzas la esprimojn „wstawka“ kaj „przystawka“ anstataŭ jam delonge uzataj en pola gramatikscienco fakliteraturo vortoj „przyrostek“ kaj „przedrostek“. Ili ja estas nun instruataj en lernejoj, do kial fari konfuzon ĉirilate?

Io simila koncernas ankaŭ la skribadon de afiksoj. Prefikso devas ĉiam havi post si malgrandan ligilon montrantan, ke post ĝi sekvas plua parto. Sufikso havas tiujn streketojn antaŭ kaj post si. Tio helpas okulmemoron kaj malebligas intermikson de sufiksoj kun prefiksoj. Tio estas ankaŭ ĉiam uzata en lingvoscienco esprimaro.

Bonkoncepta estas enkonduko de la vorto „devegi“ por esprimi la polan „musieć“, ĉar ofte la lernantoj plendis pro manko de apartaj tradukoj de polaj „powiniem“, kaj „muszę“.

Malagraba eraro estas trovebla sur la paĝo 37, kie estas skribite: „Czwartego przypadku używa się po rzeczownikach przechodnich“ anstataŭ „czasownikach“.

Preseraroj ne estas tro maloftaj, tial estus dezirinde eldoni specialan liston de korektotajoj.

## INTERESA LIBRO EN ESPERANTO APERIS.

Dank' al klopodoj de Eldona Societo Esperanto en Stockholm 1. Poŝtfolio 698 aperis la 25-an de novembro samtempe kun tradukoj en 10 malsamaj nacilingvoj ankaŭ en Esperanto sensacia libro pri la alpolusa ekspedicio de Andree. Tre grava okazintaĵo en nia propagando, meritanta tial nian plenan apogon. Mendu ĝin multnombre laŭ la indikita adreso pagante po unu ekz. nebindita 9 sved. kr., por bindita 11.50 kr.



## UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO.

POLA TERITORIO, Ĉefdelegito: J. Szapiro, Lipowa 33, Białystok.  
Konto ĉe PKO No 60.047.

### OFICIALA BULTENO No 20.

**NOVA ASOCIA JARO.** Ĉiuj ĝisnunaj membroj de UEA ricevos dum la unuaj tagoj de Novembro invitilon al realiĝo por 1931-a jaro. Mi petas atente tralegi tiun presajon kaj transdoni la aliĝon kun la kotizo al la loka Delegito aŭ — se ne estas — rekte transsendi la aliĝilon al la Ĉefdelegito, pagante la kotizon je poŝtĉekonto No 60.047. La kotizoj por 1931 restis sensange: Membro — Zł. 6.—. Membro-Abonanto — Zł. 15.—, Subtenanto — Zł. 45.—, Dumviva Membro — Zł. 500.—.

**PREMIOJ POR FRUPAGINTOJ:** Ĉiu, kiu pagos sian kotizon por la jaro 1931-a ĝis plej malfrue 31-a de Januaro 1931 rajtas laŭ la ĝisnuna kutimo elekti kiel premion unu el la sekvantaj libroj: 1) Dro Edmond Privat. *Esprimo de sentoj en Esperanto.* (Resumo de kurso, farita ĉe Geneva universitato) 60 pĝ., 2) Dro Ad. Ferrière. *Estonta eduko.* 72 pĝ., 3) Waldemar Bonsels. *Solandro.* 48 pĝ., 4) Julio Baghy. *Pilgrimo.* Kun portreto de l' poeto, 124 pĝ., 5) Julio Baghy. *Dancu, Marionetoj.* 174 pĝ., 6) C. Walter. *Gajaj horoj por Esperantistoj.* 56 pĝ., 7) Raymond Schwartz. *Verdkata Testamento.* 124 pĝ., 8) Maŭro Jokai: *La edziĝo de l' falinto, Pola Rakonto (Du noveloj).* 93 pĝ., 9) Arnold Bennett: *Ok noveloj el „La Matadoro de 5 urboj“.* 124 pĝ., 10) Margarette Catty: *Alegorioj el la Naturo.* 66 pĝ., 11) Dro L. L. Zamenhof. *Fundamento de Esperanto.* Eldono kvinlingva. 182 pĝ., 12) L. L. Zamenhof. *Lingvaj Respondoj. Plena kolekto.* 90 pĝ.

**PREMIOJ POR SUBTENANTOJ.** En sekvonta bulteno ni publikigos plenan liston de valoraj premioj, destinitaj por Subtenantoj.

**PREMIOJ POR VARBADO.** Ankaŭ por la nova jaro U. E. A. konsentas premiojn al ĉiu membro, varbanta novajn anojn por nia Asocio. Plenan liston de premioj oni povas trovi en speciala presajo, ricevebla de la Delegitoj aŭ rekte de la Ĉefdelegito.

**LASTA ALVOKO AL NEREPAGINTOJ.** Bedaŭrinde restis ankoraŭ konsiderinda aro da anoj, kiuj ĝis nun ne repagis sian kotizon por la jaro 1930. Ni tre petas, ke ili bonvolu konservi sian fidelecon al UEA kaj repagi tuj la kotizon por la jaro 1930. Ili tuj ricevos la Jarlibron kaj aliajn dokumentojn.

**STATO DE UEA EN POLUJO.** La 1-an de Novembro 1929 ni havis en Polujo 382 membrojn (3 DM, 8 MS, 241 MA kaj 139 M). Bedaŭrinde, tiu nombro montras ioman malkreskon de nia membraro kompare kun 1929, kaŭzitan pro la ekonomia krizo. Ni tamen firme esperas, ke por la jaro 1931 ni ne nur regajnos ĉiujn nunjarajn membrojn, sed povos saluti en nia rondo ankaŭ multajn aliajn Esperantistojn, dissemitajn tra la tuta Polujo. Ĉiu aktiva Esperantisto aliĝu al UEA! Memoru, ke en 1931 Polujo akceptos eksterlandajn samideanojn, kiuj venos al la XXIII-a Universala Kongreso de Esperanto en Krakovo! Ni do montru al niaj amikoj tutmondaj, ke Zamenhofa patrujo havas grandan organizitan kaj celkonscian samideanaron!

Białystok, la 1. XI. 1930.

J. Szapiro, Ĉefdelegito de U. E. A.

## DE LA REDAKCIO.

Pro manko de loko ni devis prokrasti la fakon „Pollanda kroniko“ ĝis la sekvonta n-ro.



## ATENTU!

Cu vi deziras konatigi kun fremdaj landoj kaj ties logantoj, aŭ ĉu vi deziras pli ampleksigi vian kleracon per pensinteresaĝo kun samideanoj, ĉu vi serĉas komercajn interrilatojn en-kaj eksterlandajn, aŭ ĉu vi kolektas vidaj-poŝtkartojn, poŝtmarkojn ĉiulandajn, monerojn, mineralojn, insektojn k. t. p., ĉu vi posedas fremdajn lingvojn, aŭ ĉu vi volas perfektigi je ili?

Aliĝu al la Internacia Interŝanĝa Koresponda-Klubo kaj ĉiuj viaj deziroj estos plenumataj.

Tie vi trovos adresojn de samideanoj kaj de interŝanĝantoj el la landoj de ĉiuj kontinentoj, kiuj deziras korespondi kun vi.

Por fariĝi membro estas sole necese, alsendi la jarkotizon de Rm. 5.— aŭ egalvaloro.

Ciu membro ricevas senpage kodlibron en sep ĉefaj lingvoj kaj rice ilustritan klubgazeton, kiu elvenas ĉiun okan semajnon kaj kiu enhavas interesajn vojaĝraportojn, urb- kaj landpriskribojn, fakajn artikolojn, angulojn por poŝtmarkaj novaĵoj, alilingvajn artikolojn, ŝercojn kaj komunikajojn de la unuiĝo.

Postulu senpagan provekzempleron, el kiu vi povas ekscii pli detalajn informojn.

Internacia Interŝanĝa kaj Koresponda Klubo  
Frankfurt (Oder) Louisenstr. 32.

---

---

Du 21 jaraj Anglianoj volas korespondi kun Polaj kaj Ĉefaj gejunuloj. Skribu al  
Fraŭ Marian Edge & School St. Rishton. Lancs. kaj Fraŭ Alice Holt. 45 Fairfield  
Ave. Waterfoot. Manchester."

---

---

### „POLAJ KRISTNASKAJ KANTOJ“

kun esperanta traduko de du kantoj kun muziknotoj estas aĉeteblaj ĉe:  
Admin. de Pola Esperantisto po 0.25 gr. aŭ 0.20 sv. fr.

---

---

## Libreja Fako de „Pola Esperantisto“

Kraków, ul. Lubicz 34. Konto PKO. 406.660.

### REKOMENDAS :

|  |       |
|--|-------|
| Albanio — Gvidlibro . . . . .                                      | 0.60  |
| Albumo de Kraków (34 fotoj) . . . . .                              | 0.30  |
| Albumo de l' VIII en Kraków. Luksege eldonita kun 600 fot. . . . . | 15.00 |
| Ama stelaro . . . . .  | 1.10  |
| An-Ski — Dibuk. Teatraĵo . . . . .                                 | 1.25  |
| Avsejenko — Fraŭlino Suzano . . . . .                              | 2.00  |
| Baghy — Viktimoj . . . . .   | 9.60  |
| Baluĉki — Kuzeto. Komedio en trad. de S. Grenkamp . . . . .        | 0.60  |
| Baudouin — La arto de memdisciplino: Psikagogio . . . . .          | 1.30  |
| Białystok — Gvidlibro tra urbo de nia Majstro . . . . .            | 0.60  |
| Blicher — Taglibro de vilaĝpedelo. Rakonto . . . . .               | 1.20  |
| Bennsels — Solandro . . . . .                                      | 2.20  |
| Bujwid O. prof. — Kvin prelegoj pri bakterioj . . . . .            | 1.00  |
| — La apliko de radioj ultraviolaj al sterilizo de akvo . . . . .   | 0.35  |
| Bukedo — I. kaj II. Rakontoj de diversnaciaj aŭtoroj po . . . . .  | 1.20  |
| Bultuis — Malriĉa en spirito. Dramo orig. en E. . . . .            | 1.40  |
| Butin — Faŭsto. Komentario al la I-parto . . . . .                 | 0.60  |
| Butler — Himnaro Esperanta . . . . .                               | 3.00  |
| — Kantaro Esperanta . . . . .                                      | 3.00  |
| Campe — Robinsono Kruso . . . . .                                  | 7.00  |
| Cart i Borel — Esperanto w 10 lekcjach . . . . .                   | 1.30  |
| Conscience — La leono de Flandrujo . . . . .                       | 11.75 |
| Czubryński — Esperanto i Esperantyzm . . . . .                     | 1.25  |
| — Esperantyzni. Wyd. II. . . . .                                   | 3.00  |
| Czechowski — Podróż po świecie dostępna dla każdego . . . . .      | 0.50  |

|  |       |
|--|-------|
| Dobrzański — Al mokantoj . . . . .   | 0.45  |
| Dreyfus — La vangfrapo . . . . .   | 1.00  |
| Fredro — Consilium facultatis. Komed. trad. Ant. Grabowski . . . . .                           | 1.60  |
| Gemoj de la hungara popolmuziko . . . . .  | 3.20  |
| Grabowski Ant. — Nova Antologio . . . . .  | 1.60  |
| Grenkamp-Kornfeld — Kriroj de l'koro. Poeziaĵoj . . . . .                                      | 0.50  |
| — Penseraj. Legindaj precipe en kursoj . . . . .   | 0.75  |
| — Kompletny samouczek jęz. Esperanto . . . . .   | 1.25  |
| Gryff — W sprawie nauki języków obcych . . . . .   | 0.50  |
| Herben — Malriĉa knabo, kiu gloriĝis . . . . .   | 4.50  |
| Hiller — Ho, tiuj fremduloj, opereto . . . . .   | 1.40  |
| Ibsen — Imperiestro kaj Galileano . . . . .  | 12.60 |
| Ilustrita Gvidlibro tra Pollando kaj Danzig—Gdańsk, eldon. de la<br>P. E. D. Kraków . . . . .  | 1.50  |
| Insignoj esper. (steloj) po 1.10, 1.20, 1.30, 1.40, 1.50, 1.70, 2.10.                          |       |
| Insignoj esper. por poloj . . . . .  | 2.50  |
| Jarkolekto de „Pola Esperantisto“ 1928 . . . . .   | 5.00  |
| Jarkolekto de „Pola Esperantisto“ 1929 . . . . .   | 6.00  |
| Jaumotte — Belga Antologio, franca parto . . . . .   | 10.00 |
| Jung — La alta kanto de la amo . . . . .   | 1.80  |
| Kaplan — Akordoj esperantaj . . . . .  | 0.80  |
| Karinthy — Norda vento; novelkolekto . . . . .   | 1.30  |
| Kenelm Robinson — Se ĝenereto . . . . .  | 13.00 |
| Kongreslibro de l' VIII. en Kraków. Riĉe ilustrita . . . . .                                   | 1.00  |
| Kraków — Urbo de Jubilea Kongreso 1912 . . . . .   | 0.80  |
| Kriss — Melodoj de l' nokto. Poeziaĵoj . . . . .   | 1.00  |
| Lange — Libroj de profetoj, ses poemoj; trad. Ant. Grabowski . . . . .                         | 1.50  |
| Lessing — Minna de Barnhelm . . . . .  | 4.30  |
| Malgranda terbiblio . . . . .  | 2.00  |
| Multatuli — Historio de Saidjach kaj Adinda; eld. Liem Tjong, Hie<br>Semarang — Java . . . . . | 1.85  |
| Oberrotman kaj Jung — La lastaj tagoj de Dro Zamenhof . . . . .                                | 2.60  |
| Polai Kristnaskaj Kantoj . . . . .   | 0.25  |
| Poŝtkartoj (kun moto de Żeromski) 10 pecoj . . . . .   | 0.50  |
| Reymont — En fumejo de l' opio . . . . .   | 1.20  |
| Slowacki — La patro de pestuloj el El-Arish, trad. Ant. Grabowski . . . . .                    | 1.40  |
| Staff — Aĵtunaj agordoj . . . . .  | 1.00  |
| Ŝapiro — Babiladoj de bonhumora Zamenhofano . . . . .  | 1.00  |
| Ŝiŝmanow — Ĉu estas ebla kaj necesa internacia helplingvo . . . . .                            | 1.00  |
| Ŝlosilo esper. en pola lingvo . . . . .  | 0.60  |
| Tatroj kaj Zakopane . . . . .  | 0.50  |
| Tichawski — „La Mondlingvo“, podr. Esp. . . . .  | 5.00  |
| Trochimowski — Kwestja języka międzynarodowego 10 ekz. . . . .                                 | 1.00  |
| Turno — Kompletny podręcznik Esperanta; wyd. III. . . . .                                      | 1.25  |
| — Wyższy kurs . . . . .  | 2.00  |
| Vermuyten — Belga Antologio, franca parto . . . . .  | 10.00 |
| Wiesenfeld — Galerio de Zamenhof. Kun 18 portretoj . . . . .                                   | 2.40  |
| Zamenhof, D-o Leono — Mia liro . . . . .   | 1.10  |
| Zawada — Pełny podstawowy słownik j. Esp. (esp.-pol.) . . . . .                                | 4.00  |

#### La verkoj de Zamenhof:

|   |      |
|---|------|
| Fundamenta Krestomatio . . . . .                    | 5.60 |
| Fundamento de Esper. (5-lingva) . . . . .           | 2.30 |
| Lingvaj Respondoj . . . . .                         | 2.80 |
| Proverbaro Esperanta . . . . .                      | 2.70 |
| Andersen — Fabeloj I. kaj II. parto po . . . . .    | 4.40 |
| Goethe — Ifigenio en Taurido . . . . .              | 3.30 |
| Gogol — La Revizoro . . . . .                       | 3.30 |
| Heine — La Rabeno de Baharaĥ. La Gimnazio . . . . . | 2.30 |
| Molière — Georgo Daudin . . . . .                   | 1.75 |
| Orzeszko — Marta . . . . .                          | 5.50 |
| Schiller — La Rabistoj . . . . .                    | 3.30 |
| Shakespeare — Hamleto . . . . .                     | 2.75 |

Nur antaŭpago. — Por sendkostoj aldonu 10 <sup>gr</sup>

Por rekomendita sendaĵo plu 0.50 zł. La sendaĵon nerekomenditan ni ne garantias.